

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Ing. R. Orenge, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 25

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JUNIO 1934

Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj.

De E. Drezen.

Post la milito la industrio de la ĉefaj nacioj instalas „normigajn komitatojn“. Tiuj komitatoj havas la taskon, normigi (igi unuformaj) ne nur objektojn, sed ankaŭ terminojn, do la lingvon. En la lastaj jaroj la normigaj komitatoj komencis doni atenton al Esperanto, ĉar la internacia lingvonormigo ne estas kontentige realigebla sole sur la bazo de la naciaj lingvoj.

La konsidermaniero de la oficialaj teknikaj rondoj en Germanio jam estas iom konata per mia libro pri internacia lingvonormigo, aperinta en 1931. Jus ankaŭ en la Sovjetunio aperis libro programeca pri lingvonormigo. Verkis ĝin E. Drezen, Prezidanto de la Terminologia kaj Simbola Komitato ĉe la Sovjetunia Komitato de Normigo.

La aŭtoro bonvolis sendi al mi Esperantan tradukaĵon, iom modifitan, de la sesa ĉapitro de la nova libro. Konforme al mia peto li permesis, publikigi la tradukaĵon en Heroldo; la tradukaĵo sekvas ĉi-sube. Ĝi certe interesos la esperantistojn. La sama ĉapitro aperis ankaŭ (ruslingve) en la revuo „Socialistiĉeskaja Rekonstrukcija i Nauka“ (Socialisma Rekonstruo kaj Scienco).

25. 4. 1934.

E. Wüster.

Vaste evoluigita nun laboro de Sovetunia Komitato de Normigo, celanta normigon de scienc-teknikaj konceptoj, terminoj kaj simboloj, devas akceli solvon en USSR de diversaj problemoj de interlingva normigo de scienc-teknikaj ideoj, terminoj kaj simboloj.

Grandan intereson prezentas tamen la problemo, en kia mezuro tiuj laboroj, farataj nun en Sovetunio, povas akceli solvon de problemoj pri internacia termina normaligo kaj unuigo en la tuta mondo.

Konforme al tio ni konturas en plej generalaj trajtoj la staton de koncernaj laboroj kaj la perspektivojn, kiuj tiurilate reliefigas.

Internacia unuigo de scienc-teknikaj terminoj, simboloj kaj konceptoj.

La kontradikcioj de kapitalista socio (? Red.), apartaj kvalitoj propraj al ĉiu lingvo, foresto de iuj ĝenerale konfesitaj internaciaj aŭtoritatoj por solvi ĉi-problemojn, tute esceptas eblecon sukcese labori por internacia unuigo de scienc-teknikaj terminoj kaj konceptoj (ideoj) en diversaj lingvoj.

Evoluintaj en postmilita tempo naciigaj tendencoj sekvigis interalie forigon el multaj lingvoj de internaciaj teknikaj terminoj kaj ilian anstataŭigon per malpli precizaj^{*)}, malpli oportunaj^{*)} sed kompense „naciaj“ terminoj. Kiel ek-

zemploj tiarilataj povas esti montritaj germanaj vortoj „Kraftwagen“ anstataŭ „Automobil“, „Fernsprecher“ anstataŭ „Telefon“, „Flugplatz“ anstataŭ „Aerodrom“ k. a.

Malpli grandaj malfacilaĵoj ekzistas por unuigo de scienc-teknikaj signoj, tamen malfacilaĵoj ekzistas ankaŭ en tiu kampo. Sufiĉe facile eniĝas kiel internaciaj nur signoj vere internaciaj: 1. ciferoj (ekzemple en tabeloj de klasoj de precizeco), 2. kelkaj simboloj, kiuj jam delonge fariĝis internaciaj, kiel radiksignoj, kaj 3. simboloj, derivitaj de la nomoj de certaj personoj (ekz. G — Gauss, A — Amper).

Internaciaj klasifikoj kaj ĉifradoj.

Bazita sur decimala sistemo Internacia Bibliografia Klasifiko, la Mara Signala Ĉifrado kaj la Internacia Telegrafa Ĉifrado, celantaj plisimpligi internacian komprenon kaj internaciajn rilatojn en specialaj fakoj, estas uzataj kaj rekonataj por tiuj specialaj fakoj en sufiĉe kontentiga grado. Laŭ sia esenco kaj maniero de uzado tiuj menciitaj tri sistemoj estas samspecaj, ĉar ili konsistas el aro de internacie uzataj signoj kun vortaroj, sekurantaj tradukon kaj deĉifron de la signoj en naciajn lingvojn.

De la vidpunkto de internacia unuigo aplikado kaj uzado de tiaspecaj signoj (ĉifroj) en koncernaj fakoj estas ŝpariga kaj oportuna. Samtempe tia mallongigita internacia signo, kun unueca identa

laŭsenca difino en ĉiuj naciaj lingvoj, povas servi kiel certa reguladilo aŭ bremsa, malakcelanta senordan ŝarĝadon de la senco en naciaj terminoj, posedantaj fiksitajn laŭsencajn rilatojn al koncernaj terminoj en aliaj naciaj lingvoj.

Sed la formo kaj enhavo de Internacia Bibliografia Klasifiko kaj de aliaj ĉifradoj estas tiaj, ke ili ne povas esti adaptataj al bezonoj de scienc-teknika terminaro. Samtempe ni povus esti certaj, se en 1930 ekzistus iu internacie akceptita ĉifrado, dependiganta laŭsencajn teknikajn terminojn de unu lingvo de terminoj en aliaj lingvoj, tiam ni ne havus precedentojn similajn al tiu, ke en rusaj vortaroj de la fino de pasinta jarcento elektromotora estis difinata kiel: „a) elektra stimulo kaj b) objekto kaŭzanta elektron ĉe kontakto“ kaj en nuna tempo kiel „maŝino, transformanta elektro-enerĝion en mekanikan energion“.

Sendube, ke rilate al hidrogenaj karbidoj, kies tabelon ni citas sube, sencosanoj similaj al la supre cititaj ne povus okazi, same kiel tiaj sencosanoj ne estus eblaj por latinigita zoologia kaj por botanika terminaro, bazitaj sur certaj (se eĉ science ne sufiĉe prilaboritaj) klasifikoj.

Scienc-teknika vortfarado.

En kelkaj fakoj dank' al iniciato kaj laboroj de apartaj personoj aŭ certaj internaciaj organizaĵoj eniĝas novaj internaciaj afiksoj kaj sufiksoj, kiuj permesas ligi certan klasifikan sistemon kun certa nomenklatura formo. Kiel plej bona ekzemplo de la suprecitito povas servi la tabelo de saturataj hidrogenaj karbidoj, ellaborita kohere kun kemia nomenklatura, kiu estis akceptita de internacia kemiista kongreso ankoraŭ en 1892. En la tabelo, komencante de $n = 5$, kiel prefiksoj estas uzataj grekaj nombromonoj, sekve dodekano estas $C_{12}H_{26}$, tetrakosano estas $C_{24}H_{50}$; kaj la tabelo povas esti daŭrigata senfine, sendepende de tio, ĉu tia kemia kombinaĵo ekzistas aŭ ne.

^{*)} Ne ĉiam. — Red.

Grado de saturaco	1	2	3	4	5	6
$C_n H_{2n+2}$	metano	etano	propano	butano	pentano	heksano
$C_n H_{2n}$ *	meteno	eteno	propeno (antaŭa nomo etileno)	buteno (antaŭa nomo etileno)	penteno	hekseno
$C_n H_{2n-2}$ **		etino	propino (antaŭa nomo acetileno)	butino (antaŭa nomo acetileno)	pentino	heksino
$C_n H_{2n-2}$ ***		etadieno	propadieno	butadieno	pentadieno	heksadieno

kaj tiel plu

Krom kemio, zoologio kaj botaniko povas esti menciita ankaŭ serio de afiksoj mega (10^6), kilo (10^3), milli (10^3), mikro (10^6) akceptitaj de Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC) kaj nun vaste penetrantaj en diverslingvan praktikon.

Similaj „artefarite“ enkondukitaj nomenklaturaj bazitaj sur certa klasifikaj kaj „artefarita“ enigo de afiksoj kaj sufiksoj, ankaŭ estas laŭesence elementoj de iu cifrado, sed cifrado aranĝita laŭ certa „sciencia“ sistemo kaj vestita en lingvajn formojn. Enigo de tiaj „artefarita“ elementoj en naciajn lingvojn permesas paroli pri paralela kunekzisto en la lingvo de naciaj (ekz. unu miliona) kaj ankaŭ internaciaj (unu mikrono) terminoj. Tiuj lastaj terminoj en scienc-teknika praktiko povas kelkfoje eĉ senreste anstataŭigi koncernajn naciajn terminojn.

„Interna koordinado“ de terminoj en diversaj lingvoj.

Internacia unuiga laboro en la fako de scienc-teknikaj konceptoj kaj terminoj koncernas ĉefe ne la formon kaj esprimojn, sed ilian esencan enhavon. Tiu laboro ĉefe celas starigi certan internan unuecon en la senco kaj kompreno de diverslingvaj terminoj kaj tiamaniere garantii ĝustecon de traduko de terminoj el unu lingvo en alian.

Multe okupita estas pri tiu specia laboro Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC), kreita de Internacia Elektroteknika Kongreso en 1904. IEC certe penis ankaŭ atingi „eksteran koordinon“ de la terminoj. Por tiu celo rilate al kelkaj internaciaj laŭ formo, sed ne laŭ senco, terminoj estis akceptitaj kelkaj limigoj kaj egaligoj de naciaj sencoj, sed la ĉefa laboro de IEC tamen ĉiam rilatis al „koordinado interna“.

Problemo pri internacia lingvo, kiel ĝin starigas la Internaciaj Elektroteknika Kongresoj.

Ni memoru, ke komence de 1881 Internaciaj Elektroteknika Kongresoj estis pioniroj de internacia unuiga laboro en la fako de scienc-teknikaj unuoj, konceptoj kaj terminoj, kaj ĝuste la elektrotekniko havas tiurilate plej grandan sperton. Estas do vere interese scii, kian vidpunkton oni havas rilate al la

internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj en tiu plej avangarda (ne nur en la unuigo de terminoj kaj simboloj) scienc- kaj tekniko-fako.

Delegito de Sovetunio ĉe 6-a Internacia Elektroteknika Kongreso Prof. M. Chatelaine raportis en „Investija ĈIK“ de 9. sept. 1932: „La problemoj pri internaciigo de elektroteknikaj terminoj (estas da ili ĉirkaŭ 40 000 laŭ kelkaj sciigoj) diskutigita de D-ro E. Wüster estis vigle debatata. La raportinto konkludis, ke unusola solvo de la problemoj estas akcepto de iu artefarita lingvo kaj proponis por tiu celo Esperanton. La propono estis bonvenata de multaj membroj de la kongreso, tiom pli, ke en radiodisaŭdigo la lingvo jam estas uzata: La kongreso komisiis al speciala komisiono, kiu kompilas internacian elektroteknikan vortaron, provi enkonduki apud aliaj lingvoj en la vortaron — ankaŭ Esperanton. Se la provo sukcesos, tiam dank’ al enkonduko de internacia terminaro (dispacigo de la vorto estas mia, E.D.) la uzado de alilingva literaturo kaj per tio spert-interŝanĝo inter scienculoj de la mondo estos konsiderinde faciligata“.

Estas karakterize, ke unu el pioniroj de IEC, Prof. Chatelaine, komprenis la proponon de D-ro E. Wüster kiel eblon

„starigi internacian terminaron“ (t. e. siaspecan internacian lingvan cifraron), dank’ al kiu „la uzado de alilingva literaturo estos konsiderinde faciligata“.

Evidente, ke specialistoj interesiĝas pri la problemoj ne tiom de la vidpunkto de internacia lingvo, kiom de la vidpunkto, celanta akcepton de iuj internaciaj terminoj-normigoj (cifrado). Specialistoj nun prilaborantaj teknikajn terminojn komprenas, ke en nunaj kondiĉoj, kiam tiaj normigoj mankas, ilia laboro restas sen gravaj rezultoj kaj finfine limiĝas nur per kompilado de diverslingvaj (ofte nekorektaj, ne multvaloraj) teknikaj vortaroj.

En majo 1933 en Madrido kunvenis la komitato pri ordigo de scienc-teknikaj terminoj, kunvokita de Internacia Instituto de Intelektua Kooperado. Oni diskutis problemon pri kelkaj terminoj, uzataj laŭ diversaj signifoj en fiziko kaj en kemio.

La decidoj de la Komitato fakte estis senefikaj, ĉar ili limiĝis per deziresprimoj, ke internaciaj asocioj kreu specialajn terminajn komisionojn por studi la problemon. Karakterize tamen estas, ke reprezentantoj de Francio, Prof. Cotton kaj Langevin, ambaŭ pledis por proponoj, koincidantaj kun tiuj de D-ro Wüster ĉe la 6-a Elektroteknika Kongreso.

La problemoj starigitaj de la francaj delegitoj estis solvita de la Komitato principe jese, kaj nun la akceptataj de la Komitato terminoj kaj iliaj difinoj estos publikigataj ankaŭ en Esperanto (v. Bulteno de Internacia Scienca Asocio 1933 N. 1932 pĝ. 11—12).

(Finota.)

Latinaj vortoj en Esperanto

De J. Penndorf, Plauen, Germ.

Dombestoj nomitaj parte latine:

azeno (asinus), mulo (mulus), bovo (bov-), porko (porcus), kato (cattus), kuniklo (cuniculus);

parte nacilingve laŭ la

germana: ĥundo, mopso, pudelo, ŝafo, hamstro, mevo, haringo;

angla: najtingalo (nightingale);

franca: koko (coq — l. gallus, sed „galo“ signifas ion tute alian), ĉevalo (cheval), abelo (abeille — l. apis), — same: burdo (bourdon — l. bombus), marmoto (marmotte = l. mus montanus, gr. arktomys);

itala: kapono (capone: l. capro);

ŝlava: plotto (r. plotwa, p. plotka, g. Plötze);

amerika: kolibro, papago.

El la botaniko (gr. l. botanica) estas menciindaj koniferoj (gr. l.): abio (abies), pino (pinus), pinio (pinus pinea),

piceo (picea), cedro (gr. l. cedrus), cipreso (gr. l. cyparissus = cupressus), lariko (laric-), junipero (juniperus);

foliarboj: acero (acer), alno (alnus), betulo (betula), fago (fagus), frakseno (fraxinus), hedero (hedera), karpeno (carpinus), kratago (gr. l. crataegus), kverko (quercus), laŭro (laurus), lonĉero (lonicera), mirto (gr. l. myrtus), palmo (palma), pistako (pistacia), poplo (populus), saliko (salic-), sambuko (sambucus), siringo (gr. l. syringa), [sorbo (sorbus)], tilio (tilia), tremolo (tremula), ulmo (ulmus), viburno (viburnum); rosmareno (ros marinus).

Fruktaro: ĉerizo (l. cerasum, f. cerise), pruno (prunum), piro (pirum), pomo (pomum), persiko (Persicum malum), granato (malum granatum), kaŝtano (gr. l. castanea), juglando (jugland = glans Jovis), avelo (avellana nux), figo (l. ficus, a. fig), daktulo (gr. l. dactylus), mig-

* Unu duobla kombinaĵo.

** Unu triobla kombinaĵo.

*** Du duoblaj kombinaĵoj.

dalo (gr. l. amygdala), sorpo (sorbum), frago (fragum), mirtelo (myrtillus), vakcinio (vaccinium), moruso (morum), oksikoko (gr. l. oxycccus); — groso (f. groseille = novl. grossularia), ribo (i. ribes), merizo (f. merise), abrikoto (f. abricot), kokoso (Cocos, g. Kokos, f. coco, r. kokos).

Do malofte Zamenhof preferis la vortformon de moderna lingvo.

Legomoj (legumen): asparago (gr. l. asparagus), beto (beta), brasiko (brassica), bulbo (bulbus), fabo (faba), fenkolo (feniculum), fungo (fungus), kaporo (gr. kappari), kukumo (cucumis), kukurbo (cucurbita), lento (lent-), melono (melon-), mento (menta), milio (miliium), napo (napus), petroselo (petroselinum), pizo (pisum), rafano (gr. raphanus), ranunkelo (ranunculus), rapo (rapum).

Spicoj: cinamo (gr. l. cinnam[om]um), kariofilo (gr. l. caryophyllum), pipro (piper), safrano (safranum), salvio (salvia), timiano (g. Thymian, gr. l. thymus), vanilo (f. vanille, hisp. vainilla, l. vaginula), zingibro (gr.-arab. l. zingiber).

Floroj (flor-): rozo (rosa), violo (viola), lilio (lilium), tulipo (tulipa), primolo (primula); atriplo (atriplex), cejano (gr. l. cyanus), hiskiamo (gr. l. hyoscyamus), kamomilo (chamomilla), kardo (cardus), konvalo (convallaria) lekanto (gr. leukanthus), levkojo (gr. leuko ion), leontodo (gr. leontodont-), miczoto (gr. myosotis), narciso (gr. l. narcissus), papavo (papaver).

Greno (l. granum, f. grain): sekalo (secale), tritiko (triticum) aveno (avena), hordeo (hordeum), poligono (gr. polygonum), rizo (gr. oryza).

Aliaj kreskaĵoj: filiko (filic-), kano (canna), kanabo (gr. l. cannabis), lupolo (lupulus), lolo (lolium), likeno (gr. lichen), musko (muscus), okzalo (oxalis), pastinako (pastinaca), stipo (stipa), stupo (stuppa), trifolio (trifolium), urtiko (urtica); —

laŭ nacilingva vortformo: kreno (r. chren), trufo (f. truffe), maizo (amerik., maïs f.).

Metaloj (metalla): oro (f. or-, l. aurum), arĝento (argentum), fero (ferum), plumbio (plumbum), kupro (cuprum), stano (stannum), plateno (f. platina, a. platina; gr. platys), hidrargo (gr. hydrargyrus).

Mineraloj: kreto (creta), pumiko (pumic-), siliko (silic-), aluno (alumen), sulfuro (sulfur), porfiro (gr. porphyrites), piritro (gr. pyrites).

Juvelŝtonoj (pli-malpli moderne nomitaj): diamanto (f. diamant — gr. l. adamas); rubeno (i. rubino — l. ruber), saŝiro (i. saŝifiro = gr.-arab. l. sapphirus), topazo (f. topaze = gr. l. topazus), smeraldo (i. smeraldo, gr. l. smaragdus).

Produktaĵoj: peĉo (pec-, i. pece), rezino (resina), succeno (succinum), tere-

binto (pers.-gr.-l. terebinthus), kolofono (Cclophonia resina), mastiko (masticum), kamforo (camphora).

El la **kemio** sciencaj esprimoj: hidrogeno (gr. l. hydrogenium), oksigeno (gr. l. oxygenium), azoto (gr. l. azotum), salpetro (sal petrae), salamoniako (sal Ammoniacum), vitriolo (i. vitriulo — l. vitreolus), vinagro (i. vinagro = l. vinum acre), verdigro (f. vert-de-gris, a. verdigris; l. viridis Graecus).

Sed ne nur la sciencajn tendencojn, sed ankaŭ la **praktikon** konsideris Zamenhof. Do prave li adoptis por la 12 **monatoj** la latinajn nomojn preskaŭ internaciajn: Januaro (Januarius), Februaro (Februarius), Marto (Martius), Aprilo (Aprilis), Majo (Majus), Junio (Junius), Julio (Julius), Aŭgusto (Augustus), Septembro (September), Oktobro (October), Novembro (November), Decembro (December).

Jam evidentigas, ke ankaŭ la **numeraloj**, kvankam plisimpligitaj, treege similas la latinajn tipojn: unu (unus), du (duo), tri (tria), kvar (quattuor), kvin (quinque), ses (sex), sep (septem), ok (octo), naŭ (t. e. n + la neŭtrala finaĵo aŭ — l. „novem“ enhavas la alisignifan radikon nov-), dek (decem), cent (centum), mil (mille).

Krome multego da **substantivoj** de la Esperanta vortaro vidigas nepre la latinan originon, eĉ por la plej oftaj kaj simplaj ideoj de la ordinara konversacio; aŭ ĉar la modernaj esprimoj (eĉ devenoj el la sama fonto) inter si tro varias, aŭ por eviti eblajn koliziojn, aŭ pro belsonco aŭ objektivaj kialoj.

Patro (patr-), frato (frater), avo (avus), nepo (nepos), homo (homo), viro (vir), virto (virtus), amiko (amicus), animo (animus), voĉo (voc-), lingvo (lingua), gusto (gustus), speco (species), societo (societas), gento (gent-), popolo (populus), regno (regnum), reĝo (reg-), leĝo (leg-), privilegio (privilegium), imperio (imperium), notario (notarius), sekretario (secretarius), vikario (vicarius), paco (pac-), milito (milit-), negoco (negotium), potenco (potentia), amplekso (amplexus), insigno (insigne), kruco (cruc-), denaro (denarius), unco (uncia), moro (mor-), funebro (funebr-); urbo (urb-), trabo (trab-), domo (domus), fenestro (fenestra), kastelo (castellum), stablo (stabulum), tegmento (tegumentum), fundamento (fundamentum), muro (murus), kameno (caminus), fulgo (fuligo), fulmo (fulmen), spegulo (speculum), kaliko (calic-), fasko (fascis), maniko (manica), klavo (clavis), kateno (catena); monto (mont-), ponto (pont-), loko (locus), deklivo (declive), kampo (campus), sulko (sulcus), sterko (stercus), spiko (spica), frukto (fructus), nukso (nux), radikoj (radic-), trunko (truncus), arbo (arbor), folio (folium), ligno (lignum), ŝtupo (stipes), karbo (carbo), salo (sal), vitro (vitrum), oleo

(oleum), suko (sucus), veneno (venenum), lakto (lact-), selakto (serum lactis), kazeo (caseus), sebo (sebum), sapo (sapo), feĉo (faec-), ovo (ovum), lano (lana), lanugo (lanugo), skvamo (squama), rostro (rostrum), vilo (villus), velo (velum), reto (rete), spongo (spongia), peniko (peniculus), pergamento (pergamenta), sago (sagitta), sitelo (situla), makulo (macula), maro (mare), insulo (insula), akvo (aqua), fonto (font-), putro (puteus), roso (ros), prujno (pruina), glacio (glacies), nebulo (nebula), nubo (nubes), nokto (noct-), vespero (vesper), horo (hora), minuto (minuta), sekundo (secunda), fiuro (gr. l. chorus), famo (fama), fab(e)lo (fabula), radio (radius), stelo (stella), aero (aer), infero (inferi), oriento (orient-), okcidento (occident-).

Adjektivoj: acida (acidus), akra (acr-), alia (alius), alta (altus), certa (certus), cetera (ceteri), dekstra (dextr-), feliĉa (felic-), flava (flavus), gracia (gratiosus), graveda (gravidus), humila (humilis), kara (carus), interna (internus), krispa (crispus), kulpa (culpa — subst.), libera (liber), matura (maturus), mola (mollis), multa (multus), muta (mutus), nigra (nigr-), nova (novus), nuda (nudus), plena (plenus), precipa (praecipuus), profunda (profundus), proksima (proximus), rekta (rectus), sagaca (sagac-), sana (sanus), sankta (sanctus), simila (similis), sola (solus), sonora (sonorus), vana (vanus), virga (virgo — subst.).

Ankaŭ multego da (ordinaraj) **verboj** devenas pli vere el la latina ol el latinida idiomo, ekz.: ami (amare), laŭdi (laudare), aŭdi (audire), aŭskulti (auscultare), vidi (videre), ridi (ridere), plori (plorare), kanti (cantare), salti (saltare), ludi (ludere), puni (punire), dormi (dormire), nutri (nutrire), vesti (vestire), scii (scire), konscii (conscire), fidi (fidere), dubi (dubitare), kredi (credere), kreski (crescere), spiri (spirare), iri (ire), migri (migrare), stari (stare), sidi (sedere), sekvi (sequi), voki (vocare), voli (volo), peti (petere), postuli (postulare), legi (legere), skribi (scribere), respondi (respondere), timi (timere), tremi (tremere), premi (premere), presi (pressare).

Plue: aprobi (approbare), eduki (educare), erari (errare), fosi (fossare), heredi (hereditare), insidi (insidiari), kapti (captare), ligi (ligare), militi (militare), miri (mirari), oscedi (oscitare), prediki (praedicare), prokrasti (procrastinare), remi (remare), rukti (ructare), saluti (salutare), sibli (sibilare), singulti (singultare), trakti (tractare); putri (putre-re), sorbi (sorbere), pendi (pendere), admoni (admonere); efiki (efficere), estingi (extinguere), jungi (iungere), naski (nasci), plaŭdi (plaudere), plekti (plectere), proponi (proponere), solvi (solvere), volvi (volvere), sterni (ster-

nere), trudi (trudere), traduki (traducere); ronki (gr. l. rhonchare), gargari (gr. l. gargarizare), naŭzi (gr. l. nau-seare); odori (odor — subst.), dolori (dolor!), falĉi (falc — subst.; i. falcare), rasti (rastrum, rastellum — subst.), okazi (occasio — subst.), lumi (lumen — subst.), memori (memor — adj.), fleksi (flexus — part.), produkti (productus — part.); stertori (a. stertor, l. stertere).

Aliĝas kelkaj **adverboj**: hodiaŭ (hodie), kvazaŭ (quasi), eĉ (etiam);

prepozicioj: antaŭ (ante), ĉirkaŭ (circum), kontraŭ (contra), post, en (gr. en), apud, inter, preter (praeter), sub, super, tra, trans, per, pro (propter), por

(l. pro, f. pour), pri (gr. peri?), kun (cum, con);

konjunkcioj: kaj (gr.), nek (nec), sed, jam, kvankam (quanquam), tamen, dum, se (l. si; vokale diferencigita pro la re-fleksiva pronomo „si“). —

Intence mi limigis miajn esplorojn al la radikoj entenataj en la Zamenhofa universala vortaro; tamen sufiĉe evidentiĝas, ke la bazo de la Esperanta esprimaro estas pli multe la latina lingvo ol la modernaj idiomoj, same kiel la gramatiko sendube imitas la tiparon latinan. Do, Esperanto vere estas kvazaŭ **modernigita latina lingvo**, prefigita por la plejble facila interkompreniĝo tutmonda.

86. Nun -is.

Laŭ nia opinio, oni klarigus „nun“ pli bone kiel „en la momento, pri kiu oni parolas“. Nun = tiam ĉi aŭ ĉi tiam, kiu same kiel tiam povas esti uzata en ĉiuj tempoj.

(Red.)

87. Kazo.

Laŭ nia opinio, s-ano P. B. estas prava. (Red.)

88. Pronomo: onia.

En ĉi tiu kazo oni pli bone dirus: „kiuj apartenas al alia (malsama) partio“. Sed „onia“ ne povas signifi nur: de la tuta homaro, de ĉiu partio. (Atentu: oni estu kompatema ankaŭ al homoj, kiuj ne apartenas al onia partio.) (Red.)

89. Malsimplaj tempoformoj.

La frazo mem ŝajnas esti nebone formita. Pli bona ĝi tekstus: En terura danĝero! tremadis, samkiel fiŝeto sur ŝtipeto, atenda (kiu atendas) esti tranĉata (tranĉita). En via frazo oni povas uzi: estas tranĉota, estos tranĉata, aŭ estos tranĉita; sed kompreneble ĉiu el la tri formoj donas malgrandan sencdiferencon. (Red.)

90. Ankoraŭ ne.

Generale vi estas prava; sed por klarigi la tutan komplekson de la ne-serio (ankoraŭ ne — ne akoraŭ, jam ne — ne jam ktp.), ne sufiĉas la loko en tiu ĉi rubriko. Cetere, jam aperis diskutoj pri tio. Jen interesa ekzemplo, kie oni devas uzi „ne ankoraŭ“ (sed en ĉi tiu frazo „ankoraŭ“ pli vere apartenas al „pli“ kaj ne al „ne“): „Nun almenaŭ ŝajnas, ke la krizo ne ankoraŭ pli akriĝos.“ (Red.)

LINGVA TRIBUNO

„ig“, „iĝ“.

Cu la finiĝoj „ig“ kaj „iĝ“ havas en si realan verban signifon, kaj kiom? Multfoje ŝajnis al la skribanto, ke la formalaj „igado“, „iĝado“ estis ordinare nenecesaj; ke „igo“ mem enhavas preskaŭ la tutan forton de „igado“, tiel ke „formigado“ ordinare iĝu „formigo“ (ktp. Efektive foje la verba signifo de la „ig“ en certaj esprimoj ŝajnis tiel forta kaj aktiva, ke la skribanto forte tentiĝis uzi adverbos por modifi „igo“. Cu tia uzo estus konsiderata kiel nepre malprava? J. E. Bauman.

„Tie aŭ alie.“

Sur paĝo 162 de la dua volumo de Fabeloj de Andersen ni trovas la esprimon „tie aŭ alie“ en senco de „tie aŭ aliloke, tie aŭ alie“. Cu vere Zamenhof tiel skribis, aŭ ĉu ĝi estas ankoraŭ ekzemplo de ekstermana „prituŝado“? R. Banham.

Pasaĝero.

Kun iom da miro mi legis en la noto de s-ro R. Banham pri „pasaĝero“, ke „francoj eĉ nun uzas la vorton passenger en senco de pied-vojaĝanto“.

Efektive, neniam tiu vorto havis tian limigan sencon. Neniu aŭtoron mi konas, kiu tiel uzis ĝin. Francingve la substantivo „passager“ signifas tiun, kiu: 1. ne daŭre estas en iu loko, 2. enŝipiĝas (aŭ envagoniĝas, ktp.) por pasi de iu loko al alia.

Ŝajnas do, ĉar por 1. ni havas „ŝtrepasanto“, „vojiranto“ k. a., ke pasaĝero devus en Esperanto rilati nur al 2.

S-ino J. D. L., Nice.

La Esperanta Gramatiko.

(Antaŭe: Survoje al Konsilanta Gramatiko.)

Redaktanto: Teo Jung.

Oni demandas.

86. Nun -is.

En Flena Vortaro, sub nun, ni trovas la jenan difinon: Adv. signifanta: En la momento mem, dum kiu ni parolas: nun mi foriras; li nun dormas; k. c. Neniu el la citaĵoj estas en la estinta tempo.

Spite de tio, ni trovas tie kaj ĉi tie en tradukaĵoj, ke la adverbo nun estas uzata ankaŭ kun la estinta tempo. Ekzemple, en „Princo Serebrianiĵ“, de Grafo A. Tolstoj, tradukita de s-ino M. Sidlovskaja: La princo nun revenis el Litovujo (p. 1, l. 5 de supre). . . . kaj pense jam nun estis tie, . . . (p. 2, l. 8 de malsupre).

Iafoje ni trovas ĉi tiun formon (nun -is) en aliaj tradukaĵoj. Mia demando do estas: Cu nun povas esti korekte uzata kun verbo en la estinta tempo?

Bonvolu klarigi la aferon en L. Kr. (C. L. K.)

87. Kazo.

En L. Kr. n-ro 22, p. 3, mi vidas „Ludi la kompatema samariano“. Tio certe estas eraro. Aŭ: „Ludas la kompatema samariano“, aŭ: „Ludi (kion?) la kompateman samarianon“, tio estas ties rolon! (P. B.)

88. Pronomo: onia.

Sama teksto kiel antaŭa demando: „Esti kompatema al homoj, kiuj ne apartenas al onia partio.“ Laŭ mi ĝuste: „al nia partio“, tio estas al la partio de la parolanto. Do esti kompatema al homoj de alia partio. „Onia“, preskaŭ neniam uzata, povas signifi nur: de la tuta homaro, de ĉiu partio, kaj oni ja volas esprimi ĝuste, ke temas pri la partio de la parolanto, aganto aŭ bonfaranto, do la ĝeneraliga persona pronomo ne estas pravigebla. (P. B.)

89. Malsimplaj tempoformoj.

Kiu el la du frazoj estas ĝusta: En terura danĝero li tremadis, samkiel fiŝo sur ŝtipeto estas atende tranĉota (. . . estos tranĉita)? (T. K.)

90. Ankoraŭ ne.

Ofte oni legas la formon „ne ankoraŭ“, verŝajne pro influo de franca „pas encore“. Sed mi opinias, ke „ankoraŭ ne“ estas pli ĝusta. Via opinio? (G. L.)

Oni respondas.

79. Ajn.

D-ro Zamenhof verŝajne kreis la vorton ajn, prenante ĝin de la germana esprimo irgend ein (prononcu irgend ajn) signifanta „kui ajn, iu ajn“. (B. M.)

89. Apozicio.

Cu oni intence aŭ senintence ne rimarkis la sarkasmon en la demando de „J. F. Br.“? (R. F. V.)

(Jes, ni rimarkis; sed ĉi tie ni havas aferojn nur pri demandoj lingvaj sed ne politikaj. — Red.)

81. „Fraŭlino“.

En mia juneco, kiam estis laŭmode en Britujo havi germanan instruistinojn por la infanoj, oni kutime nomis ŝin „Fräulein“. Do, „our fräulein“ tiam signifis „our german governess“. Mi supozas, ke tiu titolo persistis en Usono aŭ lastatempe tie ekuziĝis. (R. F. V.)

82. Tempindiko.

Kiel oni amas malsimpligi la lingvojn! — Esperanto entenas kelkajn tre oportunajn rimedojn, kiuj eble ne troviĝas en la plej gravaj eŭropaj lingvoj; sed ĉiufoje la gramatikistoj ne volas, ke oni profitu per tiuj. Ekzemple „morgaŭ“ povas signifi nur „en la tago post la nuna tago“ aŭ „en la tago, kiu sekvis la tagon, pri kiu ĵus temis“. — Kiel oportune, do, rakonte diri: „Hodiaŭ ni faris . . . Morgaŭ ni faris . . .“

Sed ne! Oni ne devas utiligi tiun plej oportunan rimedon! Kiel nenecese longa kaj neoportuna estas „la sekvinta tago“! La Majstro diris: „Komprenebla Esperanto estas bona Esperanto“!

Angle, nun, oni diras ne „tomorrow“ sed „the next day“ — maloportuna longa frazo, sed antaŭe ekzistis la frazo „on the morrow“, nun ne uzata plu, kiu iom similas „morgaŭ“. (R. F. V.)

(Ni jam diris en nia respondo en L. Kr. n-ro 23, ke pri la formo „morgaŭ“ oni povus eventuale diskuti, kvankam ni malkonsilas uzi la nuran adverbos morgaŭ kun -is. Alie estas pri nun; vidu respondon 86! — Red.)